

SHI Chengtai (Tailai, Ĉinio)

Al horizonto de la historio de la homaro

— pri "La Tragedio de L'Homo"

Hungaraj samideanoj multe kontribuis al Esperanto kaj ties kulturo. La ĝemelstela paro *Julio Baghy* kaj *Kolomano Kalocsay* kreis la novan etapon de la esperanta literaturo per siaj originalaj verkoj, *Kalocsay* kaj aliaj konigis al ni la hungaran literaturon per la tradukoj en Esperanto, eĉ mi povas diri, ke ĉinoj ne tiom multe kaj pli frue eklegus poemojn de *Sándor Petöfi* (1823-49), se hungaraj samideanoj ne esperantigus liajn verkojn. Ni povas apreci la ĉefverkon de la hungara literaturo, "La Tragedio de L' Homo" de *Imre Madách*, esperantigitan de *Kalocsay*, kvankam tiu ĉi eĉ hodiaŭ ne havas la ĉinan version.

Al horizonto de la historio...

Imre Madách (1823-64) devenis el nobela familio, estis edukita de idealismo kaj romantikismo dum sia epoko. Post la falo de la revolucio en 1848 por la liberigo de patrujo (mortis *S. Petöfi* dum tiu liberiga milito) lia generacio dronis en la krizoj de la epoko, kaj la pesimismo kloĉigis lin. Eĉ pasis pli ol dek jaroj, kiam *Madách* ekverkis "La Tragedio de L' Homo" (de 1859 ĝis 1860). La nacio ne reprenis sian vivoforton sub premo de la aŭstra absolutismo. Lia generacio edukita de idealismo kaj romantikismo renkontis novan filozofian tendencon de la meĥanika materialismo triumfanta en Germanio, kiu lasis la generacion de *Madách* pli komplike konsideri pri la historio: "la animo estas miraĝo, la ideo: vaporo kuireja, — la moralo: fikcio, ...la homo estas sklavo de la cirkonstancoj, lian sorton determinas blindaj fortoj materiaj, ... La generacio edukiĝinta baze de romantiko kaj idealismo ne nur perdas la bazon el sub la piedoj, sed al ĝi neniiĝas eĉ la moralaj apogiloj."¹⁾ Al la historia kaj filozofia krizoj aldoniĝis la propra krizo: la edzino perfidis lian amon. Forpelinte la edzinon el la familio, *Madách*

1) la 2-a eldono de "La Tragedio de L' Homo", p. 6

Al horizonto de la historio...

en soleco ekverkis la poezian dramon "La Tragedio de L' Homo", kiu savis la poeton el marĉo de la nihilismo kaj kies apero faris lin glora figuro en literaturo la hungara kaj la monda.

En la dramo Tragedio estas tri ĉefherooj: Adamo estas la Vivo kaj Esto, pere de kiu la poeto esploras la sorton de la homaro; Lucifero estas la pura menso, la Nenio kaj Dubo, "kiu kredas je nenio, dubas pri ĉio"²⁾; Eva estas la natura instinkto, kelkfoje "la senreviĝinta kaj malespera Adamo volas sin mortigi, sed la patrineco de Eva kvalifikas tiun memmortigon superflua kaj malebla... Pro la falemo de Eva perdiĝis la Edeno, — sed sole Eva kapablas rekrei ion en la perdo. Jen estas la senkompara supereco de Eva kontraŭ Adamo kaj Lucifero, — kaj jen estas finfina fortostreĉo de *Madách*, refuti la historion per io eksterhistoria."³⁾ La poeto metas la tri ĉefheroojn en scenaron de la historio de la homaro, en 15 'bildojn' (aktoj) de la dramo, ekde la unuaj tri bildoj el Biblio: sur Ĉielo, en Edeno kaj en Hejmloko sur la tero, sekve en Egiptio, Ateno, Romo, Prago, Parizo, Londono, ĝis en Falansterio,

2) la 2-a eld., p. 7

3) la 2-a eld., p. 7-8

Al horizonto de la historio...

la utopio kreita de la franca sociologo *Fourier* (1772-1835) kaj en tundro kovrata de glacio kaj neĝo de la eskimoj. Adamo en ĉiu bildo komence entuziasmas por la homara futuro, fine pesimisme rifuĝas kun malespero en la sekvan bildon post senreviĝo de la idealo. Tamen li refoje agas, strebas, klopodas kaj luktas. La dramon finas *Madách* per la vorto de la Sinjoro: "Mi diris, luktu, hom', kaj firme fidu!"

"La Tragedio de L' Homo" estas majesta verko, kiu parencas al "Faŭsto" de *Goethe* (1748-1832) kaj "Kain" de *Byron* (1788-1824), kun la profunda filozofia penso kaj poezia perfekteco, meritas nian legadon kaj ĝi instigas nian konsideradon pri la sorto de nia Raso — Homaro. Eĉ mi deziras supozi, kiel *Madách* verkus tiujn bildojn pri la faŝisma pogromo de *Adolf Hitler*, la masakro en Nankino, la atombombita Hiroŝimo, la purigo de *Stalin*, la Kultura Revolucio de *MAŬ* kaj Irako minacata de la usonaj misiloj, se *Madách* vivus ĝis hodiaŭ? Oni devas danki la hungaran nacion, nutrantan la filozofan poeton *Madách*, kiu omaĝas al la homaro la tragedion pri la lukta celo por la propra idealo de homaro! Ĉu la homaro

kapablas trovi la perditan Edeno-ĝardenon?


Kalocsay esperantigis tiun ĉefverkon de la hungara literaturo; en 1924 ties 1-an eldonon eldonis Hungara Esperanto-Instituto, lukse kun belaj ilustraĵoj. Post 40 jaroj li retradukis la poezian dramon; ties 2-an eldonis la eldonejo *Corvina* en *Budapest* (1965), en kiu la traduko de *Kalocsay* ŝajne estas pli flua kaj sonbela, ĉar tiam nia lingvo Esperanto fariĝis pli perfekta kaj "moderna", kaj *Kalocsay* jam estis pli sperta poezi-virtuozo. En la 2-a eldono *Kalocsay* uzis iujn neologismojn anstataŭ samsignifaj mal-vortoj en la 1-a eldono, ekz. *softa*, *aŭstera*, *fola*, *friska*, *minca*, *ŝriki* k.a.; por la metrika bezono li reordigis ritmojn, vortordojn, kia klopodo faras la dramon pli belstila.

La enkonduko de *István Sötér* en la 2-a eldono trafe kaj detale prezentas la vivon de *Imre Madách* kaj la ĉeftemon, la epokan fonon kaj la veran person kovratan sub la enigma verkformo, kies ĉefherooj el Biblio aŭ mito ĉeestas ĉiujn periodojn de la historio ekde la ekziliĝo de Pra-Homo de la homaro el Edeno ĝis siatempo de la aŭtoro. Tamen ŝajnas al mi, ke la teksto en la unua eldono estas pli

Al horizonto de la historio...

komprenebla por mi, ĉino vivanta en la orienta kulturo; la dramo ja estas el la fonto de la eŭropa kulturo. La klarigoj pri ĉiuj bildoj en la la eldono far *Kalocsay* multe helpas mian komprenon, eĉ mi bedaŭras, ke en la 2-a eldono *Kalocsay* nuligis tiujn klarigojn, eble kiuj estas la elementaj histori-scioj por la okcidentaj legantoj, tamen por ni, la orientaj, ne.

Kiam s-ano *SUN Yong* (1901-85) vivis en nia mondo, li ĉinigis preskaŭ ĉiujn hungarajn poetojn, esperantigitajn ĝis tiam, tamen li ne ĉinigis tiun ĉefverkon de la hungara literaturo. Kial? Ĉu li ignoris ties valoron? Ŝajnas ne. Eble la filozofia penso en la dramo koliziis kun la ĉefa pensfluo en la ideologia sfero dum la periodo de *MAŬ* en la tiama Ĉinio.⁴⁾ Nun ĉinoj jam havas eblecon akcepti tiun majestan verkon, mi kredas.

(1998-04-10, *Tailai*) 

4) pri tiu demando mi konsultis telefone s-anon *Chen Yuan*, la pioniro de la ĉina Esp-movado, kiu ankaŭ konsentas kun mia opinio.